estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 179 — Marto 2001

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15

## KIEL VI PENSAS PRI IES DEMANDO?

Kiam anoj de „Uji-Ĵojo Esperanto-Rondo en Japanio" kolektiĝis por la novjara kunveno, iu demandis al aliaj jene: „Mi aŭdis, ke baldaŭ oni povos uzi ilon, kiu eblos facile kaj oportune traduki de iu lingvo al ĉiu ajn lingvo. Se la afero estos vera, ĉu ankoraŭ tiam homoj bezonos kaj uzos Esperanton?"

Diversaj pensoj kaj opinioj de partoprenantoj montriĝis. Tamen kompreneble dum mallonga tempo ni ne atingis konkludon. Ne estis konkludo, sed ĉiuj pensoj estis preskaŭ samaj: „Tiu ilo – nome maŝino – nur rekte kaj simple tradukos de tiu al tiu. Al montritaj vortoj aŭ frazoj, en kiuj inkluzivas neaperita penso enmetita en homa koro, maŝino certe nek konjektos nek supozos profunde. Ĉar ĝi ne havas koron. Verŝajne ĝi nur funkcios por oficiala tradukado."

Iu ajn lingvo havas unikan karakteron, kiun alia lingvo ne havas, mi pensas. La japana lingvo havas tre multe da imitsonaj vortoj kaj adjektivoj, kiuj apereblas delikatan kaj fortan esprimon. Ekzemple, se mia ventro doloras, mi esprimas tian kondiĉon en la japana „ŝiku ŝiku" (malpeza), „kili kili" (peza).

Vento blovas „sojo sojo" (malforta kaj varmeta), „bju bju" (forta), „pju pju" (forta kaj malvarma), kaj „goo goo" (fortega). Tiam japanoj sentas agrablecon de printempo, kiam ili aŭdas la vorton „sojo sojo". Ankaŭ herboj kaj arboj eksonas „zaŭa zaŭa", fenestro „gata gata", hararo „basa basa" pro forta ventoblovo.

Tian uzmanieron de japanaj imitsonaj vortoj ne povos traduki tiu maŝino. Tamen homoj (esperantistoj) libere tradukos tiujn vortojn laŭ sia volo.

Nun mi eksciis denove, ke Esperanto ne estas ies nacia lingvo, sed pontlingvo inter diversaj homoj.

Jen problemo por Esperanto. Post la populariĝo de telefonaparato, japanoj pli kaj pli ne skribis leterojn aŭ poŝtkartojn. Kaj nun tre multe da japanoj (eĉ infanoj) havas porteblan telefonilon, kiu povas ankaŭ sendi retpoŝton. Japanoj ofte uzas delikatajn vortojn por fari frazojn, tamen lastatempe multaj japanoj malofte skribas eĉ karton. Speciale junuloj ne multe legas librojn, ne multe skribas leterojn. Pro tio, kvankam en la japana lingvo troviĝas multaj bonaj delikataj vortoj, oni iom post iom pli kaj pli forgesas ilin. Kiam oni ne pensos bezoni pli delikatajn esprimojn por sia babilo kaj skribo, tiam oni volonte uzos tradukmaŝinon en ĉiu okazo. En tiu tempo neesperantistoj diros pri homoj kiuj uzas aŭ eklernas Esperanton, ke ili estas strangaj kaj sciavidaj uloj, ĉar nun Esperanto estas ja nura hobio por homoj!

Supera rakonto estas mia supozo nereala. Tia tempo neniam venos, ĉar homoj eterne amas muzikon, naturon, romanojn kaj diversajn belaĵojn. Esperanto estas estontece vivanta lingvo, ĉu ne? Kaj kiel vi pensas? Bonvolu riveli vian opinion.

— NISHI Chizuko (Kioto, Japanio)

Estimata redaktoro:

Lastatempe mi legis en tagĵurnalo kaj ankaŭ informiĝas per radiodissendo, ke oni patentis la homan genaron. Mi komencis maltrankviliĝi pri tio. Ĉu vi opinias, ke oni permesos al mi uzi miajn genojn? Kaj kion mi faru se mi ne rajtas uzi la genojn kun kiuj mi naskiĝis?


Anksioplene via,
Kon-Fu Zita

Estimata S-ro Zita,

Dankon pro via ĝentila demando. Oni ne rajtas patenti genojn mem, nur kiel oni utiligas la informon pri genaj serioj por fari profitojn per sciencaj malkovroj, novaj medikamentoj, ktp. Ankoraŭ estas malcerte kiel kompanioj povas patenti specifajn informojn pri fragmentoj de genoj. La tuta afero povas degeneri en ĝenaj procesoj kiuj riĉigos antaŭ ĉiuj la juristojn. Sed "Ne fidu heredon, fidu posedon." Eĉ la juristoj dividas kun vi kaj ĉiu homo 99,9 % de la samaj genoj, kaj ili certe trovos metodon (eble Ĝenevan konvencion) por protekti la genetikan posedrajton. Eble avo-klaŭzo protektos viajn rajtojn... vi ja estas avo, ĉu ne?

Samideane via
Redaktoro

# KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE

1. Ruĝa frukto, uzata en salatoj.
4. Suferigema.
7. De kiu speco.
8. Katolika Di-servo.
9. Fari malkvieton.
10. Insekto, kiu faras truojn en lanaj vestoj.
12. Verda, plata parto de planto.
16. Kuiri en forno, ekzemple kukon.
17. Ujo, eble por floroj.
19. Pika parto de planto.
24. Muskoloj, graso kaj/aŭ haŭto.
26. Malvenis.
27. Purigi per akvo kaj sapo.
28. Kun plezuro.
29. Manĝaĵo el ovoj, fritita.
30. Napo, aŭ karoto, aŭ brasiko.

R = Radiko

VERTIKALE

1. Malkuraĝa.
2. Eta besto kiun kato ĉasas.
3. Kombinaĵo de io kun oksigeno.
4. Tuŝi plezur-donante.
5. Irlando.
6. Personoj, kun kiuj ni sentas nin kontentaj
11. Utila konjunkcio.
12. Manko de timo pri perfido (R).
13. Malnova muzikilo (R).
14. Frukto de kokino!
15. Utiligi.
18. Infano de besto kiu miaŭas.
20. Suka brilkolora frukto.
21. Laŭ nenia maniero.
22. Filino de filo aŭ filino.
23. Demanda vorto pri kaŭzo.
25. Saltema amfibio.

— Multan dankonP al Marjorie Boulton